

esperanto sub _____ LA SUDA KRUCO

OFICIALA ORGANO DE LA AŬSTRALIA KAJ NOV-ZELANDA ESPERANTO-ASOCIOJ

majo-junio 2007 • numero 87 | volumo 15 - numero 3



William Shatner and Ann Atmar
Scene from the Film Incubus (1965)

The first full length movie entirely in Esperanto
Now available on DVD from <http://www.incubusthefilm.com/>

ISSN 1039-9380

esperanto sub

LA SUDA KRUCO

OFICIALA ORGANO DE LA AŬSTRALIA KAJ NOV-ZELANDA ESPERANTO ASOCIJO

N^o 87 • Vol 15.3 • Majo-junio 2007

Redaktoro: Donald Broadribb

ELDONADO

Ĉi tiu numero estis kompostita kaj aranĝita de Donald Broadribb, per komputilo iMac, uzante la programon Mellel, kaj la tiparojn Futura, Onyx kaj New Century Schoolbook.

ABONOJ & PASINTAJ NUMEROJ

Abono kostas Aŭ\$40. Pagu al Libro-servo de AEA, 143 Lawson St., Redfern NSW 2016 • Aŭstralio.

libroservo@esperanto.org.au

Por membroj ekstraj ekzempleroj de *Esperanto sub la suda kruco* kostas \$A3.00 + poŝtendokosto.

Pasintaj numeroj ankaŭ surrete elŝuteblas ĉe:

<http://www.esperanto.org.au/>

Esperanto sub La Suda Kruco estas aŭtomate sendata al ĉiuj membroj de AEA kaj NZEA — pliaj informoj sur paĝo 31 de ĉi tiu eldono.

Esperanto Sub La Suda Kruco

P. O. Box 643 • York WA 6302 • Aŭstralio

☎ (08)96411937 • 📠 (08)96411134

esk@esperanto.org.au

Pri opinioj aperantaj en ĉi tiu eldonaĵo respondecas la aŭtoroj. Ili ne nepre spegulas la opiniojn aŭ de AEA, aŭ de NZEA.

© 2007, AEA & NZEA — ĉiuj rajtoj rezervitaj.

La grafikan aspekton de la formato de *Esperanto sub la Suda Kruco* preparis Igor de Oliveira Couto.

En Ĉi Tiu Numero

Dek-lira monereto (Sen Rodin).....	3
Recenzo: <i>Ĉeĥa kuracisto en koro de Afriko</i> (rec. Mike Leon)	4
Recenzo: <i>La tempo-maŝino</i> (rec. [db])	5
Nekrologo: Robby Robertson Eunice Graham	6
Laŭ mia vidpunkto (Paul Desailly)	7
Por pensumi (Mike Leon).....	9
Interrete:.....	10
La Societo Kalocsay; <i>La Mi-Klono</i> ; www.amikumu.com ; Excellent Introduction to Esperanto; Veterana Esperantista Klubo; A Fun Game; Speologiaj informoj ankaŭ en Esperanto; Nur por “Broadband”-uzantoj; Hejmpaĝo de Fondaĵo Ivo Lapenna	
9a Oficiala Aldono al la Fundamento .12	
Negrandaj informoj atentindaj.....	13
Internacia Virino-Tago 2007; Mi ŝatis en la Somerkursaro...; Agado en Filipinoj; La avantaĝoj de Urboĝemeligo per Esperanto; Esperanto-instruisto serĉata por Respubliko Kongo.	
Esperanto-vortaroj	16
Raporto pri Kongreso de NZEA (David Ryan).....	17
Spacaj vizitantoj al Christchurch (Howard Gravatt).....	18
<i>ESK</i> en pdf-formo	21
Competition to Find Name for the AEA Libraro	22
Skribas la legantoj (D. Gary Grady) ...	23
Konu viajn kungesamideanojn: Brendan Linnane (Katja Steele)	24
Mark Twain en Esperanto	25
Neforgesebla sperto (Franciska Toubale)	26
Vintra kunveno en NSW	27
For the Beginner ([db]).....	28
Important Message from the Secretary.....	29

Atentu!

Ŝanĝo de limdato

La limdato por *ESK* julio-aŭgusto estas la 5a de junio.

Dek-lira monereto

Rakonto de Sen Rodin

En 1961 ni estis geedzoj de tri jaroj. Ŝi 23-jara, mi 29-a. Post la geedziĝo en Sofia – kie ŝi laboris kiel redaktoro de la radia Esperanto-programo – Ljuŝka povis elmigri al Italio nur danke al ŝvitigaj diplomataj manovroj. Tiam furiozis la malvarma milito, inter niaj du landoj leviĝis senkompate la “fera kurteno”, enaere pendis la minaco pri atommilito. Por havigi al ŝi la elirpermeson devis persone interveni la sekretario de la itala komunista partio. Ŝi lasis en Sofia sian patrinon Svilka, 45-jaran vidvinon, kaj amatan katinon, Miŝka. Sed dum tri jaroj ŝi perfekte lernis la italan lingvon, akiris taŭgan laboron, bone kutimiĝis je la itala vivmaniero.

Mi estis instruisto kaj muzikisto, sed ĉefe pacisto-esperantisto. En Padova vivis mia patrino, 66-jara pensiulino, vidvino.

Ĉiusezono ni vojaĝadis tra Eŭropo por viziti samideanojn, ĉiusezone gastigis ilin ĉe ni. Tagon alvenis mezaĝa atleteca gajhumora blondulo el Aŭstralio. Kiel kutime ni vizitis kun li Venecion kaj aliajn regionajn belaĵojn. Li, entreprenestro en Sidnejo, montriĝis inteligenta ulo, tre simpatia. Aldone li perfekte parolis Esperanton. Ni amikiĝis.

Tagon li surprizis nin per eksterordinara propono. “Aŭdu”, li diris, “mi konstatas, ke vi estas bravaj, laboremaj, honestaj gejunuloj, krom perfektaj esperantistoj. Nu, kial vi restas ĉi tie, kie eble baldaŭ eksplodos freneza milito? Ĉe ni, en la alia

mondflanko, estas paco, vastegaj spacoj, mirindaj belaĵoj, saltantaj kanguruoj, nokte oni admiras la Sudan Krucon... Mi povus tuj havigi al vi ambaŭ bonkvalitan laboron ĉe mia entrepreno, decan loĝejon, multajn Esperanto-amikojn. La anglan vi jam duone paroletas, post unu jaro vi parolos ĝin flue. Do, kie troviĝas malfacilaĵo? Mi invitas vin, mi esperas, ke vi akceptos”.

Ni, iom ŝokitaj, dankis lin kaj petis iom da tempo por pripensi la proponon. Estis malfacile decidi. La vivoŝanĝo sendube allogis nin: se ni akceptus, ne atendus nin nigra truo, sed amikeca medio kunligata de forta Esperanto-fadeno. Aliflanke ni devus forlasi niajn eŭropajn amikaron, laboron, parencaron. Tiutempe Aŭstralio aperis ekstreme malproksima, alimonda: la vojaĝon oni ne alfrontis facilanime. Elmigri tien estis vidata kiel definitiva malapero el Eŭropo.

Ni estis sendecidaj. La afero ravis nin, sed la Padovaj-Sofiaj ligoj estis fortaj, la du patrinoj prezentis problemon. Pridemandite, la patrino de Ljuŝka respondis: “Nu, iru, mi esperas ke poste vi venigos tien ankaŭ min.” Mia patrino: “Se vi vere deziras, iru, sed ... mi maljuna restos sola, eble ne plu vidos vin ...”

Ni rezonadis, diskutadis, la alternativoj prezentiĝis egalpezaj. Dume la aŭstraliano atendis pacience, sed evidentiĝis lia nervozeco. Li ja devis reveni al sia entrepreno kaj deziris koni nian decidon antaŭ

la forveturo. Ni pasigis noktojn sen-dorme, cerbumis – vane. Fine ni adoptis heroan–malkuraĝan elirvojon.

Tagon ni prezentiĝis al mia patrino, tronanta en sia Fraŭ-fotelo, kaj delikate diris: “Panjo, ni dezirus iri, sed ne volus kaŭzi vian suferon. Ni ne kapablas elekti. Tial ni decidis konfidi nin al la sorto. Jen monero. Bonvolu ĵeti ĝin. Se aperos “kapo” ni

restos, se aperos “kruco” ni elmigros.”

Mia patrino gapis, sed silentis. Post hezito ŝi prenis la moneron, ĵetis ĝin enaeren, la monero papilumis, falis planken: “kapo”. Tial ni rezignis pri Aŭstralio kaj restis en Italio.

Jes ja, dek-lira monereto povas decidi vivosorton. — □



• Recenzas Mike Leon

Marcel Drlík: *Ĉeĥa kuracisto en koro de Afriko*. Tradukis O. Glendová. Aventinum, Praha. 2006. 191 paĝoj. Prezo: €10.20 ĉe UEA; €7 + sendokosto ĉe la tradukinto: glendaigor@volny.cz

En la jaro 2000, d-ro Marcel Drlík alvenis en Centrafrika Respubliko. Tie, meze de la tropika arbutaro kaj spite al senĉesa manko de sanitaraj rimedoj, la 29-jara ĉeĥa kuracisto volontule servis al la kamparanoj dum unu jaro kiel ĝenerala kuracisto, infankuracisto, ginekologo, akuŝisto kaj ĥirurgo. Li fariĝis ŝatata kaj amata bonfaranto ĉe la loĝantoj de vasta regiono, kaj li spertis multajn eksterordinarajn travivaĵojn, kiujn li priskribas en ĉi tiu libro.

En Centrafrika Respubliko (averaĝa vivespero: 40 jaroj), li renkon-

tis socion en kiu ordinaraj homoj posedas preskaŭ nenion kaj kies registaro okupiĝas pri nenio kaj neniu ekster la ĉefurbo. Sekve, ĉie videblas la malnoblaj efikoj sur la homan koron de konstantaj malriĉeco kaj nesekureco, nome senkompateco, koruptebleco. Sed ne nur tio. D-ro Marcel ankaŭ renkontis homojn honestajn, sindonemajn, diligentajn en la servo al la samhomoj, bonajn amikojn kaj kolegojn, dankemajn gepatrojn, kaj la universalan gajecon kaj petolemon de infanetoj.

Kaj li renkontis kulturon, la plej malnovan sur nia planedo, la patrinon de ĉiuj kulturoj, kulturon tute fremdan al li, al kiu li pene adaptiĝis, fine kompreninte gravan veron, nome ke Afriko ne estas Eŭropo; Afriko ĉiam restos Afriko.

Bele ilustrita per abundo de ko-

lorfotoj kaj desegnaĵoj, la libro ne nur estas atentoveka rakonto pri aktualaj kondiĉoj en la plej malriĉaj landoj de la mondo. Ĉi tiu historio pri juna kuracisto en koro de Afriko

ankaŭ provizas fortan dozon de realeco al ĉiuj, kiuj volus sammaniere voluntuli en komunumoj kun fortaj indiĝenaj tradicioj ie ajn en la mondo.



Recenzas via redaktoro

H.G. Wells: *La tempo-maŝino*. Tr. el la angla de E.W. Amos. Dua eldono. Rotterdam: Eldonejo Bero, 2006. Serio utopia #4. 82 paĝoj.

Takso: 🍷🍷🍷

Ĉi tiu sciencfikcia libro, el 1895, estis la unua romano de H.G. Wells.

Temas pri viro kiu inventas maŝinon per kiu li povas veturi en la tempo. Lia unua veturo estas al la jaro 8271.

La viro trovas ke en 8271 la homaro estis evoluinta tiel ke ĝi fariĝis du specoj. La unua kiun li renkontas konsistas el relative malgrandaj personoj, bone vestitaj kaj bone nutrataj per fruktoj (neniom da viando li vidas), kiuj sin distras kaj ludadas dum la taglumo, tute sen laboro, tute sen zorgoj. Ilia lingvo estas grave degenerinta, kaj ilia intelekto estas evidente tre malalta. La konstruaĵoj estas malnovaj, iom kadukaj, kvazaŭ restinte el malnova epoko kiam la teknika civilizacio estis ankoraŭ tre avangarda.

Bestojn li tute ne trovas. Strange, ankaŭ tombojn, kremaciejojn, kadavrojn li ne vidas. Eĉ ne maljunulojn.

Perpleksige: la tempo-maŝino ekmalaperis, sendube ŝtelita.

Misteraj nelarĝaj putoj abundas, kaj strangaj sonoj venadas el sub-

tere. Kelkafoje la tempo-vojaĝanto ekvidetas fantomaspektajn palulojn, kiuj rapidege malaperas. Pri ili, kaj pri la putoj kc. la homoj rifuzas paroli.

Tuj kiam noktiĝas, la homoj sin premas en grupdormejojn, kaj timegas eksteren iri.

Scivoleme, la tempo-vojaĝanto decidas esplori la putojn kaj informiĝi pri la palaj fantomeculoj, nomataj Morlokoj. Li subegrimpas en puto, kiu havas enkonstruitan eskalon, kaj ĉe la fundo trovas tunelon. Lumo apenaŭ penetras en la tunelon. Ju pli mallumiĝas, des pli sonoj de la subteruloj intensiĝas — ŝajnas ke la subteruloj timas lumon tiom kiom la surteruloj timas mallumon. En la mallumo la subteruloj klopodas kapti lin. Li trovas ke ili uzas maŝinojn, restintajn el antaŭa epoko. Kontraste al la fruktomanĝantaj surteruloj, la subteraj Morlokoj manĝas nur iom strangaspektan viandon.

Sukcese regrimpinte en puto ĝis la taglumo, kien la Morlokoj timas lin sekvi, la tempo-vojaĝanto meditas, kaj fine la terura vero trafas lin: la surteraj homoj estas kvazaŭ brutoj, kiujn prizorgas la subteruloj...por ilin manĝi. Parto de la homaro evolue fariĝis hom-predantoj, alia parto de la homaro evo-

lue fariĝis hom-pred-aĵoj.

La Morlokoj estis ŝtelintaj la tempo-maŝinon, sed kompreneble ne sciis uzi ĝin. Tamen per ĝi ili lo-gas la tempo-vojaĝanton por lin kapti, kaj nur lastamamente li suk-

cesas eskapi per ĝi.

La rakonto estas ekscita, la stilo tre bona — vere rimarkinda unua romano de H.G. Wells. La traduko estas glata kaj bona. Distra kaj pensiga verko. □

Nekrologo

Robby Robertson

(1917/04/07 – 2006/08/21)

de Eunice Graham, kun la afabla helpo de Igor Couto.

Profesoro Robert George Robert-son naskiĝis en Penrith, Norda Anglio. Gajnite stipendion por studo de matematiko en Universitato de Oxford, li eniris la inĝenieran fakon, kaj post diplomiĝo desegnis maŝinojn por elektro-centraloj. Kvankam nur 23-jaraĝa, tiam li fariĝis Inĝenier-leŭtenanto en la avi-ada fako de la militmaristaro, kaj estris 800 subulojn en la inĝeniera fako.

En la jaro 1944, Robby estis sendita al Aŭstralio, kiel staba inĝenieroficiro. Post la milito, en 1946, Robby reiris al Anglio, kie li de 1946 ĝis 1950 laboris en fabriko por heli-kopteroj.

En 1950, Robby decidis migri al Aŭstralio. Li fariĝis docento ĉe la Universitato de Teknologio en Sid-nejo. Li poste fariĝis Supera docento, en 1963, kaj en 1972, Subprofe-soro pri Mekanika Inĝenierio. Li emeritiĝis en 1977.

Robby komencis lerni Esperan-ton en Sidnejo, ĉe la Klubo de Manly, en 1965. Post nelonge, li fariĝis instruisto, kaj membro de la

Estraro de la Klubo. Li estis Prezid-anto de la Esperanto-Federacio de Nova Sud-Kimrujo de 1968 ĝis 1970.

En 1972, Robby elektiĝis Prezid-anto de la Aŭstralia Esperanto-Asocio, kaj plenumis tiun oficon ĝis 1980. Li estis poste Prezidanto de la Klubo de Manly, de 1980 ĝis 1998. Li estis dum tiu periodo ankaŭ Fak-delegito de UEA — de 1973 ĝis 1985. Li ricevis la titolon “Fratulo de AEA” en 1984, pro elstara servo al Esperanto, kaj ricevis honoran dumvivan membrecon de AEA en 2004.

Robby partoprenis multajn aŭstraliajn kaj internaciajn kongresojn de Esperanto. Li ofte prelegis pri Esperanto, kaj eminente diskonigis Esperanton per paroladoj en diversaj komunumaj grupoj — Rotario, Probus, Universitato de la 3a Aĝo, ktp.

La multaj amikoj de Robby sendas sian tutkoran kondolencon al Margaret, kaj al la tuta familio Robertson. □

☞ • *Laŭ mia vidpunkto*
 bahaa dilemo
 de Paul Desailly

Verŝajne la plej grava leciono el la kroniko de la historio estas la influo kaj la konsekvencoj de religia gvidado post kiam la Fondintoj estas forpasintaj. Kaj foje la silento kaj neglekto de Ilij institucioj. Akordi kun ĉiu vorto kaj ago de la Universala Domo de Justeco ne estas devo absoluta por bahaano. Cetere, kiu tute komprenas ĉiun nuancon el la plumo de Bahá'u'lláh kaj la tutan amplekson de ĉiu klarigo de nia ĉefa institutio bahaa? Tiom kaj tiel diversaj abundas la spertoj kaj scioj de la Universala Domo de Justeco, ke baze nur al Dio ĝi estas respond-eca.

Postulataj de bahaanoj per nia sankta interligo kun Dio estas agnosko de Bahá'u'lláh kiel la Disendito por nia erao, kaj obeado al Liaj ordonoj kaj institucioj. Aldone, bahaanoj inter si devas interkonsiliĝi en la plena senco por ke veroj manifestiĝu ĉe ni. Bahá'u'lláh estas verkinta:

“Por ĉiuj aferoj necesas konsulti. Tion vi forte emfazu, ke ĉiuj plenumu konsultadon. La intenco de tio rivelita de la Skribilo de la Plejaltulo estas, ke konsultado estu plene plenumata ĉe la geamikoj pro tio, ke ĝi estas kaj ĉiam estos kaŭzo de konsciiĝo kaj vekigi kaj fonto de bono kaj bonfarto.”

Obeado estas antaŭkondiĉo de

unueco; konsenti kun ĉio ne estas kondiĉo de bahaaniĝo. Aliflanke, profunda konsultado laŭ mi nepre necesas, antaŭ ol la cetera mondo volos sin turni al la Bahaa Kredo por trovi respondojn al ĉiuj siaj moralaj krizoj kaj etikaj demandoj. Al kiu nia socio turniĝu, se ne al Tiu kiun ni konsideras la plej eminenta Instruanto kaj Edukanto de la homaro?

Ekzemple, pri fundamenta afero de “kiam kreigiĝas animo?”, kristanaj kaj islamaj estroj inter si ne konsentas. Novaj kaj gravaj demandoj venas nun de pli kaj pli da landoj, inkluzive Aŭstralio, kiuj allasas esploradon pri stemĉeloj por terapiaj celoj kaj limigita homa klonado. Grandparte estas tre kapablaj homoj, bone edukitaj kaj altruismaj, kiuj serĉas gvidadon tiukampe.

Farantoj de decidoj pri etiko en la nuntempa Aŭstralio – kaj multaj homoj kredas, ke necesas sin turni al ili – bezonas konsilojn de bahaanoj. Krome, malpliigiĝas la nombro da homoj el ĉiuj okupoj kaj profesioj konsiliĝantaj kun pastroj, imamoj, ks. Pli multnombraj estas hodiaŭ tiuj kiuj serĉas respondojn al moralaj demandoj en la scienco, t.e. Bioetiko. Kelkfoje, eĉ post preĝado, studado, kaj konsultado niaj estroj kaj saĝuloj bahaaj ankoraŭ nek elpensis nek publikigis iujn etikajn klar-

igojn. Tiam ni unuopaj kredantoj devas honeste kaj simple konfesi nian nescion malgraŭ la ironio. Pro sia preteco diskonigi klarajn decidojn pri kompleksaj kaj aktualaj temoj rilate socian justecon la Unuiga Eklezio (The Uniting Church) populariĝas inter kristanoj kaj spronas la amaskomunikilojn raporti pri ĝiaj vidpunktoj. Tio okazas nun, en tempo, kiam multaj eklezioj daŭre perdas membrojn. Kio okazos, kiam ni bahaanoj, provizitaj per la saĝo de la Estro de la Vinberejo skribita de Lia propra mano, levos la voĉon?

Nemalmultajn bahaanojn konfuzas granda elspezo por starigi administradon, monumentajn konstruaĵojn ktp, kompare kun relative magera buĝeto por helpi malriĉulojn. Sistema kaj vasta konsultado montros al ĉiuj racian bazon de tiu ĉi nuntempa politiko. Same amikoj kiel malamikoj nin pridemandos. Ni estu do preparitaj! (Aldone, ankoraŭ neniu adepto de la Bahaa Kredo scias kial virinoj ne rajtas servi kiel membroj de la Universala Domo de Justeco. Pri tio kontentigos iujn homojn nenio. Tamen, ni bahaanoj devas obei ĉar Bahá'u'lláh, la Promesito de ĉiuj popoloj de la mondo, tion dekretis. Lia rezonado iĝos finfine kristalklara, laŭ 'Abdu'l-Bahá; honesteco kaj konsultado ĉion malkaŝos. Eĉ se ne plaĉas al ni tiu ĉi situacio kaj ni ankoraŭ ne komprenas Lian rezonadon, ni obeas pro tio, ke ni agnoskas Liajn saĝon kaj aŭtoritaton.)

Aldone, ni neniel kaŝas ĉi ĉion; male, ni konsultadas ene de la bahaa komunumo kaj ekster ĝi, eĉ se tia konsultado estas malfacila. Ni

ne evitas tion, ĉar ni scias, ke el la kolizio de diversaj opinioj ekfloras la brila sparketo de la vero. Tiu malfacila konsultado fine allogas serĉantojn al la Fido, ĉar ĝi reliefigas nian bazan kredon je rajtegaleco de viroj kaj virinoj. Mallonge: konsultado aldonas lumon al lumo, sed la malo kondukas al la nekonata, al ver-evitemo, kaj fine al hipokriteco.)

Vera konsultado malofte okazas en etoso de reciproka flatado, kie ĉiuj konsentas. Ju pli defia estas konsultado (kompreneble oni observu la etiketon de ĝentileco), des pli magnetosimile ĝi altiras publikan atenton. La bahaa komunumo disponas je la konsiloj en la Sanktaj Skriboj kaj spertoj de siaj anoj, kiuj ebligas al ni racie debati pri ĉiu ajn temo, egale kiel tikla ĝi estos.

Post du jardekoj da aliĝo de la Bahaa Kredo, mi persone ne komprenas kial tiel malmultaj el niaj samreligianoj ekzamenas ege seriozan averton de Shoghi Effendi, verkitan naŭ jarojn post la fino de la Dua Mond-Milito. Malmultaj bahaanoj povas nomi "la ĉefan faktoron rapidigi terurajn afliktojn kaj mondskuantajn krizojn kiuj nepre inkluzivos bruligadon de urboj. *Antaŭguston* [emfazo aldonita de PD] de la detruigo de tiuj mondensuĉantaj fajroj, per kiuj la urboj de la nacioj partoprenantaj en tiu ĉi tragika lukto estos pereigitaj, prezentis la Dua Mond-Milito." En kontrasto kun tiu malvaste konata kaj malprecize priskribita terurego, kiun la homaro ne povas eviti sed nur mildigi, estas medikamento inda je nia plena konsultado, ĉar ĝi

estas laŭ ‘Abdu’l-Bahá “la plej granda virto de la epoko”, rekomendita de Bahá’u’lláh kiel “la plej grava instrumento por altigi harmonion”, kiu por citi la Universalan Domon de Justeco “necesigas la plej urĝan atenton.”

Kio do allogas tiom da superlativoj kaj multaj pli el neniam ŝanĝeblaj bahaaj skriboj laŭlonge de la vojo al kaj rekte rilatantaj al (a) realigo de la monda paco (b) harmoniigo de inter si disputantaj religioj (c) instruado de la Kredo mem? Ho mia Dio! Ĉu ekzistas pli gravaj aferoj? Ĉu la Gardanto povus esprimi pli drastan averton? Ni bahaanoj, kiuj gratulas unu al la alia pro niaj supozataj lertoj de konsultado, kon-

statu ke ĉi supraj superlativoj aludas al nenio alia ol Didonita principo agnoskita de la Deklaracio de Homaj Rajtoj de Unuiĝintaj Nacioj, t.e. – *universala helpa lingvo*.

“Se iu asertas, ke la vero estas per li kaj prezentas siajn pruvojn, tiuj kiuj volas refuti lin devas montri pruvojn same validajn kiel liaj. Se ili sukcesos, liaj vortoj montriĝos vanaj kaj ili venkos; alikaze liaj vortoj ne ĉesos kaj liaj pruvoj ne vaniĝos. Mi admonas vin, ricevintojn de La Bayan, se vi volas aserti vian pravecon, kontraŭstaru nenium se vi ne montras pruvojn similajn al liaj, ĉar la vero staros firme, dum ĉio alia certe pereos.” *Bab Kitab-i-Asma*. XV11.11. □

Por pensumi de Mike Leon

En la tutlanda censo de Nov-Zelando en marto 2006, ĉiuj homoj (civitanoj kaj vizitantoj) devis respondi al la demando: “Per kiu(j) lingvo(j) vi kapablas paroli pri ĉiutagaĵoj.” Respondis 120 personoj “Esperanto”. Tio estas 0,0000289% de la loĝantaro (<http://www.ibiblio.org/lunarbini/worldpop>), aŭ 28.9 Esperanto-parolantoj en ĉiu miliono da loĝantoj.

Se la sama procento parolus nian lingvon en ĉiu lando, estus tiom da Esperanto-parolantoj en jenaj landoj:

Ĉinio — 37 973

Usono — 8 625

Brazilo — 5 435

Rusio — 4 129

Japanio — 3 683

Germanio — 2 82

Francio — 1 759

Aŭstralio — 585

La tuta mondo havus 188 577 parolantojn de Esperanto. [*el Arĝenta filiko marto 2007*]

Vere interese. Laŭ miaj spertoj, la nombroj pli-malpli kongruas kun la konataj faktoj, ± kelkmil personoj ensume. — □



• Interrete

La Societo Kalocsay

havas jam proprajn retpaĝojn. La “Internacia Amika Societo Kalocsay” kiel memstara jura persono estis fondita en la jaro 1991, gvidate de Csiszár Ada. Ĝi okupiĝas unua-

vice per la flegado de la Kalocsay-vivoverko, kaj hodiaŭ jam havas pli ol 40 membrojn. Adreso de la retejo: <http://www.esperanto.hu/kalocsay/>.

La Mi-Klono

Se vi deziras legi originalan sciencifikcian Esperantan, iru al: <http://www.genekeyes.com/MC-MK/MC-MK-U-Contents.html>.

Ĉi tiu romano legeblas en paralelaj anglalingvaj kaj esperantolingvaj kolumnoj, kaj ankaŭ estas elŝutebla kiel pdf-o se vi tion deziras.

Per www.amikumu.com

vi povas facile amikumi kun aliaj esperantistoj tra la mondo. Vi povas trovi proksimajn amikojn, homojn kun samaj intereso, kaj ankaŭ libere diskuti en niaj novaj babilejo kaj forumo. En Amikumu ĉiu povas krei profilon en kiu li aŭ ŝi prezentas sin. Vi povas informi pri kio vi interesigas, kaj alŝuti fotojn.

Ankaŭ eblas en Amikumu serĉi esperantistojn, ekzemple laŭ intereso, kaj aldoni amikon al via konto. Similas al la eblecoj, kiujn donas la retejoj de MySpace kaj LiveJournal. Verŝajne la plej interesa opcio en Amikumu estas la ebleco

trovi per Google Maps la loĝlokojn de ĉiuj uzantoj. Tiel oni povas vojaĝi ĉirkaŭ la mondo, vidante kie kiu loĝas. Aparta paĝo montras al vi liston de uzantoj ordigitaj laŭ proksimeco al vi, do vi povas malkovri nekonatajn esperantistojn eĉ en via urbo!

Ni konstatis, ke ne ĉiam facilas ekhavi kontaktojn kun esperantistoj, ĉu en propra regiono, ĉu kun samaj intereso. Eblas ekhavi internacian amikaron. Per Amikumu, vi povas pli facile interkonatiĝi, kaj plene uzi la avantaĝojn de Interreto.

Excellent Introduction to Esperanto

The Irish Esperanto Association, at <http://www.esperanto.ie/english/contents.htm> has one of the most thorough and well arranged Internet sites we have seen for telling people everything they want to

know about Esperanto. If you have friends you would like to introduce to Esperanto, recommend the site to them. You might even find some interesting things for yourself there, too!

Veterana Esperantista Klubo (Vek)

La kriterio por membreco en VEK estas minimume kvardekjara Esperantisteco. Membro kun minimume kvindekjara esperantisteco nomiĝas jubileano kaj la membro kiu esperantistiĝis plej frue estas la dojeno de VEK.

Kvankam VEK estis fondita en 1949 ĝi pasivas jam de pluraj jaroj. Pro tio oni decidis provi reaktivigi ĝin kun novaj, utilaj celoj: krei arkivon de homoj kies profundaj spertoj

pri la lingvo kaj la movado povas esti utilaj por doni informojn kaj konsilojn al la nunaj gvidantoj de la movado kaj ties historiistoj.

Ĉuj kvalifikitaj homoj estas invitataj membriĝi en VEK. Kvankam la kotizo estas libervola, la rekomendita sumo egalas al tiu de Membro kun Gvidlibro de UEA en la concerna lando. Bonvolu anonci vin al UEA kiu sendos al vi enketilon/aligilon.

There's a fun game at

<http://members.iinet.net.au/~nicolee/game.html>

which beginners in Esperanto might like to try. A little reasoning is all you need to solve it, and it's

good exercise for the mind freshly coming to grips with how Esperanto works.

2 Esperanto-radioj, 24-hora elsendo per broadband

Tage kaj nokte iam ajn oni povas ĝui esperantan muzikon aŭ esperantajn radioelsendojn Interrete. Lastatempe aperis 2 stacioj, kiuj senhaltj elsendas esperantajn aŭdoprogramojn.

1. Radio-Esperanto.com: Esperanta muziko en elektebla formato mp3 aŭ ogg. Krom aŭskulti la muzikon, ofte legeblas ankaŭ la teksto de la kanto. La prizorganto/redaktoro Tony Freeman, bonvenigas vian helpon per elsendo de mankantaj tekstoj. Provu ĉe:

<http://www.radio-esperanto.com>

2. Esperanto-Radio Jászberény:

Relative nova radioprogramo, redaktata de Harnyos Ferenc,

<hferenc@pr.hu>

en Jászberény, Hungario. La 24-hora elsendo inkluzivas esperantan muzikon, intervjuojn, reelsendojn de malnovaj programoj, aŭdo-interesaĵojn, ripeton de programoj de Pola Radio, ktp. Formato de la elsendo-fluo: mp3. Provu la elsendon: <http://87.242.26.81:8000/listen.pls>

Multaj homoj enŝaltas radion por havi fonan muzikon dum la tago. Kial tiu fona muziko ne estu esperanta, se vi estas apud komputilo? [Laŭ *Ret-info*]

Speologiaj informoj ankaŭ en Esperanto

Ĉe:

<http://www.scintilena.com/esperanto/>
vi povas legi novaĵojn pri grotoj kaj

kavernoj. Fine de marto tiu sito informis, i.a., pri kavernoj trovitaj (per fotoj) sur Marso!

Nur por "Broadband"-uzantoj

(Via redaktoro, kiu ne povas aŭskulti broadbandojn, ne aŭdis la ĉisekvajn programojn, do ne povas taksi ilin.)

Radio Vatikana: nun disponigas arkivon de siaj elsendoj, aŭskulteblaj per mp3. Adreso: <http://www.radio-vatikana-esperanto.org/index.php>

Kep Enderby estis intervjuita pri Esperanto en la programo *Late Night Live* de la aŭstralia ABC en februaro. La intervjuo okazis kadre de longa programo, kaj estas aŭskultebla kiel *podkasto*. Por trovi ĝin uzu la URL-on www.abc.net.au, kaj en la serĉilo tajpu Kep Enderby. □

Hejmpaĝo de "Fondaĵo Ivo Lapenna" renovigita

Antaŭ kelkaj tagoj, la 27-an de marto 2007, ekfunkciis la renovigita retejo de la "Fondaĵo Ivo Lapenna". Ĝi estas tre interesa ne nur el historia vidpunkto, sed ankaŭ el vidpunkto de la hodiaŭa moderna tempo – kaj same aktuala ankaŭ por estontaj generacioj

En la retejo estas troveblaj abundaj informoj ne nur pri la vivo,

personeco kaj agado de Lapenna mem, sed ankaŭ pri la fondaĵo kaj stipendio "Lapenna", la Instituto Ivo Lapenna, kaj estas aŭskulteblaj kaj elŝuteblaj pluraj liaj paroladoj en formato mp3.

Adreso de la retejo: <http://www.ivolapenna.org>

Retpoŝta adreso:

<lapenna@mobilixnet.dk> □

.....

9a Oficiala Aldono al la Fundamento de la Akademio de Esperanto

<http://www.akademio-de-esperanto.org/>

La 10an de marto la Akademio de Esperanto publikigis la *9an Oficialan Aldonon al la Fundamento* kun 209 radikoj, kiujn ĝi decidis oficialigi.

Kiam la Akademio oficialigas radikojn, tio formale signifas, ke ĝi aldonas tiun radikojn al la Universala Vortaro, kiu estas parto de la Fundamento de Esperanto. Praktike tia oficialigo havas la karakteron de forta rekomendo. La Akademio esperas, ke ĝiajn rekomendojn la uzantoj de la lingvo atentos kaj trovos utilaj.

En antaŭaj Oficialaj Aldonoj la radikoj kaj vortoj estis klarigitaj precipe per tradukoj en naciajn lingvojn, ĉefe en la kvin naciajn lingvojn de la Fundamento, sed ankaŭ en aliajn lingvojn. En tiu ĉi Naŭa Aldono la Akademio elektis uzi nur difinojn en Esperanto sen tradukoj nacilingvaj, opinante, ke nia lingvo nun estas sufiĉe matura por povi difini siajn proprajn vortojn. Multajn el la difinoj akompanas helpaj ekzemploj.

Plenan liston de la 209 radikoj kaj la difinoj oni trovas ĉe la AdE retejo.



● Negrandaj informoj atentindaj

Internacia Virino-Tago 2007

de Mary Ziesak



Poŝtmarko eldonita de la Aŭstria poŝto, je la 1a de majo 2007, dediĉe al la Internacia Virino-Tago 2007.

Ni salutas vin kaj ĝojas kun la japanaj virinoj de Hiroŝima je la okazo de la Internacia Virino-Tago 2007; ni deziras al vi grandan sukceson por via Konferenco kaj por la filmo “Vitra Kuniklo”.

Internacia Virino-Tago estos celebrata tra Aŭstralio en multaj urboj kaj vilaĝoj per matenmanĝaj kunvenoj, seminarioj, publikaj kunvenoj (kaj en parkoj kaj en kunvenoj), kaj organizitaj paradoj.

“Paco tra la Mondo” kaj “La Rajtoj de Virinoj” estos la ĉefaj temoj por niaj agadoj je Internacia Virino-Tago. Ni konscias pri la malegalecoj kiuj alfrontas virinojn en multaj landoj. Ni konscias pri la teruraj kondiĉoj kiujn virinoj (kiel patrinoj kaj zorgantoj) suferas pro milito. Ni ankaŭ konscias ke virinoj kaj infa-

noj neeviteble estas grandnombre viktimoj de milito — se ili ne rekte estas mortigitaj aŭ vunditaj, tamen ili ofte estas atakataj, seksatencataj, aŭ malnobligataj; ili senhejmigas; ili estas kiel rifuĝantoj en sia lando; aŭ ili devas fuĝi al fremdaj landoj, kie ili mizere vivas en tendrifuĝejoj. Ni en Aŭstralio tage vidas kaj aŭdas pri tiuj kruelaj realaĵoj per radio kaj televido.



Poŝtmarko eldonita de Islando, en februaro 2007, “100 jaroj de rajtoj de virinoj”

Multaj organizaĵoj laboras por persvadi la aŭstralian nacian registaron ne elfosi kaj eksporti uranion. Ili scias ke ĝi tre facile povas esti uzata fabriki nukleajn armilojn. Ni certe ne forgesis pri Hiroŝima kaj Nagasaki!

Je Internacia Virino-Tago 2007, ni kunsentas vian ĝojon, kaj laboreme celos pacan mondon por estontaj generacioj, kie virino havos egalajn rajtojn en ĉiuj sferoj de vivo, kaj kie registaroj starigos “Departementojn de Paco” anstataŭ “Departementojn de Defendo aŭ Milito”. □

Mi ŝatis en la Somerkursaro...

de Katja Steele

Forlasi la ĉiutagaĵojn kaj por kelkaj tagoj enmergiĝi en la Esperanto-

mondon estas en si mem ripetinda sperto. Mi pasigis sep tagojn en Ho-

barto kadre de la ĉijara Somerkursaro kaj jen kion mi tie pleje ŝatis:



1. La lokon, kie nia aranĝo okazis. Ni loĝis kaj aktivis en universitataj konstruaĵoj sur unu el la montetoj. Tage kaj nokte ni povis admiri la luksan panoramon “sub” ni: Riveron Derwent, la imponan Tasman-ponton, la insuletojn, velŝipojn kaj ĉion, kio ĉirkaŭas la urbon.

2. La ekskursojn. Unu privatan al bela-premiga Port Arthur kun halto en pitoreska Richmond, kaj la

komunan perbusan al la monto Wellington.

3. La grandan grupon de infanoj (13), kiuj ĉeestis la kursaron kaj la evidente serioze interesigantajn junulojn — pluraj el kiuj estis komencantaj esperantistoj.

4. Kaj tute ne laste, la abundon de manĝaĵoj, kiujn ni ne devis prepari, kaj kiujn mi povis manĝi nerapide, en agrabla kunesto de samideanoj.

[el *Tamen Plu*]

Agado en Filipinoj de HORI Yasuo

Lastajn aŭguston kaj septembron Bharat Ghimire el Nepalo gvidis Esperanto-kursojn en Manilo, Filipinoj, kaj sukcesis fondi Esperanto-Asocion por Filipinoj. Mi timis, ke la entuziasmo, kiun vekis Bharat, velkos post lia foriro, kaj mi opinias, ke stabiligi la movadon estas mia tasko. De la 23a de januaro ĝis la 1a de februaro mi restis en Filipinoj por revigligi la movadon.

Jen estas mia konciza raporto:

1. Kurso en filipina Normala Universitato 1/24,25,26,29,30,31 po du horojn; pli ol dek homoj partoprenis, plejparte studentinoj en la universitato plus membroj de la asocio: Lydia Liwanag, profesoro/prezidanto de la Esperanto-Asocio; profesoro Merry Ruth, Venus Cruz kaj Ruchell Remolacio (*Women*

Lead) plus kelkaj universitatoj.

2. Esperanto-ŝranko en la oficejo de Lydia Liwanag.

Antaŭe UEA kaj ĉi-foje JEI kaj Libroteko Tokio donacis librojn, por kiuj ni faris ŝrankon de Esperanto, por ke interesitoj povu pruntepreni esperantajn librojn facile.

Renkonto kun la prezidanto de la universitato: La Esperanto-Asocio havas intencon enkonduki Esperanton en la universitatan kurson, do mi rekomendas tion al li.

Pri lernolibro kaj vortaro:

1) Mi ne povis renkonti Jeordanon, kiu redaktis la lernolibron kaj vortaron surbaze de tiuj de Ranganayakulu de Hindio. Li estis ironta al Kataro por labori. Tial mi ne povis renkonti lin kaj ne povis labori por la libroj. Tio estis mia

granda bedaŭro. Poste li sendis al mi la tekstojn, kiujn mi transsendis al Venus kaj ŝi redaktos.

2) Provizore Merry Ruth havas intencon redakti *Basic Esperanto-Grammar*, kiun mi verkis, kun la traduko de la tagaloga.

Resume: 60% da sukceso. Havi kurson kaj renkonti aktivulojn de la Asocio estis bone, sed ne povi labori por la lernolibro kaj la vortaro estis

malsukceso. Malbonŝance Jeordan estis okupata pri la preparo de la ekiro al Kataro kaj ne povis aranĝi la taskon por mi.

Mi esperas ke filipinaj esperantistoj festos la unujaran datrevenon de la fondo de la asocio, en septembro.

<hori-zonto@water.sannet.ne.jp>

10-27 Simosinden Maebasi Gunma 371-0822 Japanio.

La Avantaĝoj De Urboĝemeligo Per Esperanto

Eble ne ĉiuj scias, ke en marto 2005 la urbestroj de Herzberg (germana urbeto apud Hanovro) kaj de Gora (Pollando) renkontiĝis kaj surbaze de decido de la respektivaj urbaj konsilioj, deklaris la du urbojn ĝemeligitaj kaj decidis ke la reciprokaj oficialaj rilatoj okazos per Esperanto. Al tiu ĉi senprecedenca rezulto kontribuis la agado de la Esperanto-societo en Herzberg.

Ne temas pri nur surpapera decido, ĉar ekde la menciita dato la kunlaboro inter Herzberg kaj Gora akiris tre konkretajn formojn. Ekzemple: en somero 2005 la Esperanto-societo en Herzberg du semajnojn gastigis kaj trejniis sep instru-

istinojn el Gora, kiuj poste vastaskale instruis la internacian lingvon en sia urbo. Plej originala estis samjare la dusemajna internacia Arb-ara Lernejo apud Herzberg, dum kiu multaj infanoj el ambaŭ landoj plibonigis sian esperantan lingvoscion. La sama iniciativo ripetigis en 2007 kun la partopreno de trideko da gelernantoj kaj geinstruistoj.

Alia aspekto de la ĝemeligo estas la multenombraj kursoj de Esperanto okazantaj en ambaŭ urboj.

Ĉu ne temas pri modelo de internacia kunlaboro, kiun oni devus imiti?

Por pliaj informoj:

<http://www.icherzberg.de>

Esperanto-instruisto serĉata por Respubliko Kongo [Kongo-Brazavilo]

Pro ekinteresiĝo de la loka loĝantaro pri Esperanto sekve de vizito de du eksterlandaj esperantistoj, nun la prezidanto de la loka asocio, Eden Loubaki, (loubakend@yahoo.fr) serĉas esperantiston, kiu kapablas instrui per rekta metodo (la eŭropa lingvo parolata tie estas la franca), kaj kiu pretas adaptiĝi al la lokaj

kondiĉoj, kiam temas pri vivo. Luksaĵoj, elektraj aparatoj, ktp. estu ekster la normalaj bezonoj. Jes ekzistas elektro, malgraŭ kelkhoraj aŭ tut-tagaj problemoj de tempo al tempo, kaj ekzistas ankaŭ retkafejoj surloke.

La interesiĝanto pagu mem siajn vojaĝ-kostojn sed li estos gastigata

surloke. La periodo de restado de-
pendas de interkonsento kun Eden

Loubaki, prezidanto de Kongola Es-
peranto-Asocio.

La Esperanto-movado en Ganao estas reorganiziĝanta.

Ili bezonas lernolibrojn, kasedojn
kaj KD-ojn en la angla por siaj ko-
mencantoj kaj progresantoj, kiuj aĝ-
as inter 8 ĝis 18 jaroj.

Adreso:
Alfred Kobina Arthur
P O Box TS 404
Teshie Accra
Ganao
retadreso:abaako43@yahoo.com

.....

Esperanto-Vortaroj

Ĉu vi deziras povi konsulti Esperanto-vortaron per via komputilo, dum vi
verkas aŭ legas epoŝton, esperantolingvan siton, romanon aŭ novelon en
Esperanto? Tio donas multajn avantaĝojn: ĉefe, oni povas tre rapide serĉi
kaj trovi deziratan vorton.

Jam pluraj Esperanto-vortaroj konsulteblas per la Reto. Jen kelkaj el
ili:

Esperanto-English Dictionary: <http://esperanto-panorama.net/vortaro/eoen.htm>. Pli ol 15 000 vortoj.

Sonja's English-Esperanto Dictionary ĉe <http://www.kisa.ca/vortaro/>.
Oni povas entajpi vorton anglan aŭ esperantan, kaj tuj ricevi la tradukon,
kun helpaj klarigoj.

Travlang's Esperanto-English On-line Dictionary ĉe <http://dictionaries.travlang.com/EsperantoEnglish/> kaj ankaŭ *Travlang's English-Esperanto On-line Dictionary* ĉe <http://dictionaries.travlang.com/EnglishEsperanto/>,
kun 15 500 terminoj.

Ĉe <http://www.dicts.info/2/english-esperanto.php> vi povas entajpi aŭ an-
glan aŭ esperantan vorton, kaj trovi la tradukojn.

Vi povas konsulti kaj/aŭ elŝuti *HejmaVortaro* de Jouko Lindstedt ĉe
<http://www.helsinki.fi/~jslindst/hejmvortaro.html>. Tre valora kaj utila vortaro
por trovi ĉiutagajn vortojn esperantajn por ĉio trovebla en la hejmo.

English-Esperanto Running Dictionary ĉe <http://www.runtheplanet.com/resources/dictionaries/english-esperanto.asp>, kompilita de nia propra
Trevor Steele, enhavas multajn utilajn sed malfacile troveblajn tradukojn
de ĉiutagaĵoj.

Eblas konsulti la *Australian and New Zealand Esperanto Dictionary* ĉe
<http://www.esperanto.org.nz/anzed/anzed.html>

Kaj se vi deziras amuzi vin, rigardu la *Interlingue-Esperanto dictionary*
ĉe <http://www.windsong.demon.co.uk/jottings/ie-to-eo.html>. Kaj eĉ *Espe-
ranto-Interlingue dictionary* ĉe [http://www.windsong.demon.co.uk/jottings/
eo-to-ie.html](http://www.windsong.demon.co.uk/jottings/eo-to-ie.html)! □

Raporto pri kongreso de NZEA

raportas David Ryan

La ĉijara kunveno de la Nov-Zelanda Esperanto-Asocio (NZEA) okazis en Christchurch dum la unua semajnfino de februaro. Ĉeestis preskaŭ 20 gesamideanoj, kun vizitantoj el Luksemburgo, Japanio, kaj Francio. Kiel kutime, la kongreso havis tre amikan etoson kaj la vetero en la bela suda urbo estis tre varma.



Tomoko Yoshinaga, Japanio; Albert Winkler, Luksemburgo; Monique Vitse, Francio

La membroj de NZEA jarkunsendis kaj elektigis David Ryan el Wellington kiel la nova Prezidanto. David dankis al Bradley McDonald kiu prezidantis dum ok jaroj. David prezentis al Bradley atestilon pri lia elekto en 2006 kiel Fratulo de NZEA pro lia altnivela posedo kaj uzado de Esperanto. Reprezentantoj el Auckland, Wellington kaj Christchurch raportis pri la agado de la kluboj en tiuj urboj dum 2006. Ŝajne ofte venas eksterlandaj vizitantoj al Nov-Zelando kiuj profitas de viziti lokajn klubojn.

Krom la necesaj oficialaj aferoj, la programo ankaŭ enhavis lingvan session, distran vesperon, kaj di-

versajn prelegojn, ekzemple pri la geologia historio de la regiono Canterbury en la suda insulo, la somera kurso en Hobarto, UEA kaj la delegita reto, kaj diversaj interesaj faktoj pri Luksemburgo.

La nova Prezidanto gvidis sesion por evoluigi la strategion de NZEA. La celo por 2007 estas sendube informado pri Esperanto, kaj la kongresanoj pridiskutis diversajn manierojn por eduki ne-membrojn pri Esperanto. Ideoj inkludis stipendiojn aŭ premiojn por studentoj, plian uzadon de la reto, anoncojn en gazetoj, eldonon de nova faldfolio ktp.

Resume, la kongreso estis sukcesa kaj NZEA bonstatas kun entuziasmaj membroj kaj rimedoj por informi pri nia lingvo.

Oceania Kongreso en Auckland en 2008

La ĉefa tasko de NZEA por 2007 estos la organizado de la kongreso en Auckland en januaro 2008, kiel kuna evento kun AEA. NZEA esperas ke tiu estos vere granda "Oceania Kongreso" kaj intencas vaste propagandi pri ĝi en la eksterlanda movado kaj precipe en Nov-Zelando kaj Aŭstralio, por altiri novajn personojn kiuj volas scii pri Esperanto.

La komenca dato de la kongreso estos la 14-a de januaro kaj ĝi daŭros ĝis la 23-a de januaro. La kongresejo (St Francis Retreat Centre) situas inter la internacia flughaveno kaj la urbcentro kun dormĉambroj en la kongresejo mem.

Pliaj informoj sekvos, sed intertempe NZEA intencas inviti eksterlandajn instruistojn por gvidi kursojn je diversaj niveloj, tiel ke la evento estos kvazaŭ eta somera kurso. La programo enhavos kursojn, prelegojn, distraĵojn kaj ekskursojn en la regiono de Auckland, eble kun vizito al maoria domo por ke eksterlandaj vizitantoj konu la

maorian kulturon.

Certe la evento estos pli ol simpla kongreso kaj NZEA esperas ke venos sufiĉe multaj el niaj esperantistaj “gekuzoj” el Aŭstralio. Por NZEA, gravas ke la evento estu granda sukceso por altiri novajn esperantistojn kaj krei pli vastan scion pri Esperanto en Nov-Zelando. □

Spacaj Vizitantoj al Christchurch de Howard Gravatt

Skeĉo prezentita al la NZEA-kongreso 2007.

Personoj de la dramo: Kapitano Bredli McDonald
Kaparolo Malgrava Grava-to-to
Urbestro S-ro Davido Devaro

ANTAŬPAROLO

Estas la jaro 2007. Kapitano McDonald kaj lia lakeo, Kaparolo Malgrava Grava-to-to, alterigis sian spacŝipon el la eksa planedo Espero-Plutono en Christchurch. Ĉar la astronomiaj sciencistoj deklaris, ke ilia hejmlöĝejo, Plutono, ne plu estas planedo, iliaj estroj sendis ilin por serĉi novan hejmlandon por la milionoj da enloĝantoj, kiuj vivas sur ilia eksa planedo.

Niaj du spacaj vojaĝantoj ne malŝparis tempon por kapti malfeliĉan civitanon de Christchurch. Ili tuj komencas demandadi lin pri la taŭgeco de la distriko por koloniigado de iliaj kunplaneduloj.

KAPITANO McDONALD: Nu, Grava-to-to. Kion kaj kiun havas ni ĉi tie?

KAPAROLO GRAVA-TO-TO: *(Li tiras la ŝnuron ĉirkaŭ la kolon de la kaptito.)* Venu terulo! Vi aŭdis la demandon de nia komandanto. Kiu estas vi?

S-RO DEVARO: Kompaton, mi petas de vi. Mia nomo estas Davido Devaro, civitano de Christchurch.

GRAVA-TO-TO: Tio ne estas la tuto! Vi parolas nian lingvon, kaj ni lernis, ke vi estas grava persono en ĉi tiu urbo. Diskonigu la veron. Malkaŝu la sekreton.

S-RO DEVARO: Mi ankaŭ hazarde estas la urbestro.

McDONALDO: Do vi parolas nian lingvon, Esperanto. Bone. Ni povos paroli kun vi Cantabrianuloj, kiel mi aŭdis vin nomitaj. Neniu neceso por tiuj ĉagrenaj kaj tedaj interpretistoj. Ĉu ne!

S-RO DEVARO: Mi bedaŭras diri, ke estas nur ĉirkaŭ dekdu parolantoj de Esperanto en nia urbo.

McDONALDO: Dekdu! Sur nia planedo, ĉiuj parolas la universalan lingvon.

S-RO DEVARO: Kiel diable, vi faris tion!

GRAVA-TO-TO: Esperanto estas deviga kaj krome ni havas metodojn kaj rimedojn. Ni baldaŭ batos prudenton en la loĝantojn ĉi tie!

S-RO DEVARO: Kiel vi informiĝis pri Esperanto sur Espero-Plutono?

McDONALDO: Antaŭ ĉirkaŭ du generacioj, unu el niaj esploradaj spacŝipoj surteriĝis apud ĉi tie kaj sekrete observis kunvenon de la Christ-church Esperanta Societo.

GRAVA-TO-TO: Plej eble eĉ vi aŭdis pri NIFOJ, neidentigitaj flugantaj objectoj.

S-RO DEVARO: Kiel vi tiom rapide disvastigis la lingvon?

McDONALDO: Tio estis facila. Ni jam havis bonan kapablon je Ido, kiu ni alprenis dum plifrua vizito al via Tero. Mi kredas, ke vi nomas tiun lokon Eŭropo.

S-RO DEVARO: Tiam, vi faris retroiran paŝon. Ĉu ne?

McDONALDO: Certe ne! Ni nur decidis, ke la gepatra lingvo estis pli bona. Ni tiam komencis fari Esperanton la deviga lingvo.

S-RO DEVARO: Tio devis esti malfacila.

McDONALDO: Tute ne! Ni estas superprogresita civilizacio kaj diference faras aferojn ol vi Teruloj. Vi baldaŭe trovos tion kiam ni alvenos je grandaj nombroj.

GRAVA-TO-TO: Ĉiuj parolos Esperanton. KREDU MIN!

S-RO DEVARO: Ho Ve! Vi intencas, ke la tuto de miaj lecionoj en la maoria, la ĉina kaj la pangaba estos sen celo?

GRAVA-TO-TO: Jes ja!

S-RO DEVARO: Kaj kio pri mia kara angla?

McDONALDO: Nenio! Ni havas metodojn, sciu.

GRAVA-TO-TO: Diru al ni, Terulo, la nomon de ĉi tiu vilaĝo. Ŝajnas esti unu-ĉevala urbeto kompare al niaj metropoloj.

McDONALDO: Jes! Ni volas scii ĉu ĉi tiu loko estas taŭga por la milioj kiuj devos elmigri de nia kara planedo — dankon al viaj malhelpaj sciencistoj, kiuj deklaris Esperanto-Plutonon ne esti planedo.

S-RO DEVARO: Kaj pensi, ke mi estis maltrankvila pri la tiel nomita “azia invado”!

GRAVA-TO-TO: Do diru al ni, Terulo, kial ĉi tiu Christchurch-distriko taŭgus al ni.

S-RO DEVARO: (*Flanke al la aŭskultantoj, en la angla*) This is a desperate situation. I must put them off. I will relate all the bad features.

McDONALDO: Kion vi diris?

S-RO DeVARO: Nenion. Mi devas averti vin pri la vintroj. Vi malŝatos niajn vintrojn. Jes, neĝo kovras la kamparon dum multaj seĝmanoj.

McDONALDO: Evidente vi forgesas, ke Espero-Plutono estas multe pli for de la suno ol via Tero. Ni dispelas la neĝon kaj glacieron per atomaj hejtiloj. Ne nia problemoj! Vi forgesas ke ni estas altgrada civilizacio.

S-RO DEVARO: Sed en la sumero ni havas tiujn varmegajn nord-okcidentajn ventojn kiuj kaŭterizas ĉion inkluzive de homoj. Vi trovos ilin netolereblaj.

GRAVA-TO-TO: Nenia problemoj refoje! Diru al li, Komandisto, kiel ni uzas la montaran neĝon kaj la marakvon, kompreneble sensaligitan, periode por bani la grundon, kiam necesas.

McDONALDO: Jes, ja! Terulo, vi aŭdis kion mia lakeo diris. Mi pensas, ke la milionoj sur nia planedo entuziasmiĝos vivi ĉi tie. Mi ne povas atendi por reiri por prezenti mian favoran raporton.

S-RO DEVARO: (*Flanke kaj angle al la aŭskultantoj.*) Dear God! I am getting nowhere. I must try another tack. Aha! An idea. Anything is worth a try!

McDONALDO: Nu, nu Terulo! Neniom da ĉi tia parolado malantaŭ niaj dorsoj!

S-RO DEVARO: Oni diras, ke Christchurch estas la ĝardena urbo de Nov-Zelando. Multe de floraj ĝardenoj kaj legumoj.

McDONALDO: Ĝardena urbo! Neniom utila por ni. Ni ne manĝas tian specon de vegetaĵaro. Ni estas altgrada civilizacio. Ni progresis preter tiu etaĝo.

GRAVA-TO-TO: Certe ne! Ni Espero-Plutanoj vivas per piloloj. Multe da ili. Ekzemple, nur ĉi matene, mi havis bonan matenmanĝon konsistan el ses nigraj, kvin purpurruĝaj, kvar turkisaj kaj du indigaj piloloj. Fakte tre bongusta, kaj saniga.

S-RO DEVARO: Via popolo ŝatus niajn produktivajn ebenaĵojn kun la miriga Suda Montaro kiel fono. Centoj da kilometroj da rektaj vojoj. La ebenaĵoj estas la manĝkorbo de Nov-Zelando.

McDONALDO: Ni jam rakontis al vi, ke ni nin nutras per piloloj.

S-RO DEVARO: Vi kaj via nomo sonas skotaj. Kiel okazis?

McDONALDO: Refoje antaŭ multaj jaroj, aliaj NIFOJ vizitis Skotlandon kaj ni McDonaldoj prenis la ŝancon eskapi la regadon de la angloj. Ĉar mi estas McDonald nia popolo estas parenca al la popolo de la skota montaro. Ni kutimas al la montoj kaj la valoj.

GRAVA-TO-TO: Aj! Jes! Tro multe da plateco pelus nin al frenezeco.

S-RO DEVARO: (kun ruza rideto) Aha! Kia domaĝo! Ho ve, kiel triste, ne gravas!

McDONALDO: Kaj kiujn aliajn ne dezirindajn aferojn vi havas ĉi tie?

S-RO DEVARO: Ni estas tre fieraj pri nia rugbea teamo, “La Crusaders.” Ili gajnis multajn trofeojn. Ni havas pasion koncerne rugbeon. Ĉu vi ludas la rugbeon?

McDONALDO: Certe ne! Ni ne povas kompreni la regularojn,..tio estas, se ili efektive ekzistas. En la angla ili parolas pri “Rucks, Mauls, Stomping, Spear-tackles, Eye-gouging”! Kia speco de aktivo estas tio! Barbar-eco! Ni estas altgrada civilizacio. Ne por ni, dankon. Nun, kio estas via nacia rekordo por ĵetado de la stangoj?

S-RO DEVARO: Mi ne scias.

McDONALDO: Nu, kompreneble niaj altgradaj korpaj atletoj, nun, anstataŭe ĵetas elektrajn stangojn.

S-RO DEVARO: Ni ankaŭ estas tre fieraj, ke nia kolonieto komence estis angla komunumo kaj estis bazita laŭ anglaj tradicioj. Fakte, la reĝino de Anglujo ankaŭ estas la reĝino de Nov-Zelando.

McDONALDO: Nu! Tio troas por mi! Miaj prapatroj forlasis Skotlandon por eskapi la superregon de la angloj — la Sassenachoj. Ĉu vi pensas, ke ni volus refoje vivi inter ili?

S-RO DEVARO: Eble vi lernus kelkajn aferojn de ni.

McDONALDO: Mi apenaŭ kredas tion. Venu Grava-to-to! Ni foriĝu de ĉi tie. Devas esti multe pli bonaj lokoj en la kosmo ol ĉi tie.

GRAVA-TO-TO: Vi estas la estro! Nia spacŝipo estas preta por la foriro. Adiaŭ, Terulo. (Ili eliras)

S-RO DEVARO: Multajn dankojn al niaj dezirindaĵoj. Ni valorigos ilin eĉ pli en la estonteco. Kiu povas uzi pecon de ŝnuro?

(Li ofertas la ŝnuron al la aŭdantaro) □

Esperanto sub la suda kruco en pdf-formo

Ĉu vi sciis ke se vi deziras ricevi *ESK*-on en pdf formo per epŝto anstataŭ en papera formo, vi povas aranĝi tion sen ekstra pago. Kontaktu la sekretarion <sekretario@esperanto.org.au>. La elektronika formo estas kolora!

Competition to find name for the AEA libraro/ Konkurso por nomi AEA Libraron

Dear fellow esperantists,

As you may be aware the AEA Library based on Ralph Harry's collection is to be moved to a new location (either Sydney or Melbourne). We are seeking suggestions of name for the new facility.

E.g. Nacia Esperanto-Muzeo de Aŭstralio

This competition is open to anyone. Please invite your friends to take part. The name may be in Esperanto or English.

A prize will be awarded to the winner.

(Books chosen from the Libroservo to the value of \$50)

Closing date for entries is 30th June, 2007.

The winning entry will then be decided by a ballot on the AEA Retforumoj.

Replies may be sent to Barrie Cledsmith by mail, telephone, email or text message.

Please use the following email address:

cledsmith@hotmail.com

S-ro Barrie Cledsmith

Komisiono AEA Libraro

2/56 Carlisle Street, St Kilda,

Victoria 3182

Tel (03) 9534 3254 or

04322 95352

Karaj geesperantistoj,

Kiel vi eble konscias, AEA Biblioteko, bazita je la kolekto de Ralph Harry, moviĝos al nova loko (aŭ Sidnejon aŭ Melburnon). Ni serĉas sugestojn pri nomo por la nova biblioteko.

Ekz. Nacia Esperanto-Muzeo de Aŭstralio

Iu ajn rajtas partpreni la konkurson. La nomo povos esti en Esperanto aŭ en la angla. La gajninto rivevos kiel premion, librojn je \$50, elektotajn ĉe la libroservo.

La fina dato por sugestoj estas la 30a de Junio, 2007.

Poste oni povos elekti la gajnintan nomon per baloto ĉe la retformoj de AEA.

Bonvolu respondi al Barrie Cledsmith per poŝto, telefono, retroŝto aŭ tekstmesaĝo.

La retroŝtadreso estas:
cledsmith@hotmail.com

S-ro Barrie Cledsmith

Komisiono AEA Libraro

2/56 Carlisle Street, St Kilda, Viktorio 3182

Tel (02) 9534 3254 aŭ

04322 05352

Ĉu vi volas legi vian artikolon en Esperanto?

Esperanto sub la Suda Kruco ĉiam serĉas artikolojn por publikigo. Ne timu, la redaktoro gramatike korektos vian verkon se necesas. Sendu ĝin al esk@esperanto.org.au.



• Skribas la legantoj

D Gary Grady skribis:

En la cetere tre interesa artikolo de Brian Fox en la julia-aŭgusta numero, aperas la aserto ke “la moviĝo de la kapo supren kaj malsupren estas universala por ‘jes’; la la turno de la kapo dekstren kaj maldekstren estas tutmonda por ‘ne’.”

Fakte, en diversaj kulturoj, inkluzive en Bulgario kaj partoj de Grekio, Turkio, kaj Sudafriko, la signifoj de la kaggestoj estas inversaj. En Hindio oni skuetas la kapon horizontale por montri, ke oni atentis la vortojn de alia, same kiel en multaj aliaj mondopartoj oni kapjesas laŭ la pli ofta maniero.

Alia afero rilate komunikadon: En la sekva numero Donald Broaribb mencias, ke li kaj lia edzino sukcesis trankviligi kaj silentigi bruajn anserojn per ĝentilaj salutvortoj. Mi havis similan sperton. Trans la strato de mia hejmo kaj du-tri domojn maldekstre loĝas hundo, kiu kutimas insiste boji kontraŭ mi kiam mi alvenas hejmen. Mi eksciis, ke se mi amike salutas la hundon, svingante la manon kaj kriante “Vuf-vuf!”, tio kontentigas

la hundon, kaj li ne plu bojas. (Utilas scii eĉ unu frazon en alia lingvo.)

Unu tagon mi alvenis hejmen, eliris la aŭton, kaj aŭdis la bojadon de mia kvarpieda najbaro. Do mi ridete alrigardis lin kaj salutis lin mangeste, samtempe dirante, “Vuf-vuf!” kiel kutime. Sed li ne silentis. Do mi iom pli entuziasme svingis la manon kaj pli laŭte kaj ripete kriis, “Vuf-vuf! Vuf-vuf! Vuf-vuf!” Sed la hundo senĉese bojadis.

Mi ne povis konstati, kial ĉi-foje la hundo ne akceptas mian amikan saluton.

Sed tiam io instigis min retrorigardi. Du domojn for en la alia direkto ĉe mia flanko de la strato staris najbarino en sia antaŭ ĝardeno, preskaŭ mortanta pro ridado...

DGary.Grady@gte.net

— Pli da informo pri la kaggestoj, kiujn mi ĵus trovis en la reto:

Ŝajnas, ke la situacio eĉ pli komplikas, ol mi supozis!

<http://lloyd.emich.edu/cgi-bin/wa?A2=ind9212d&L=linguist&D=1&F=P&P=805> □

Via esperanta radio-stacio 3ZZZ

Ne forgesu vian aŭstralian esperantan radio-stacion 3ZZZ, aŭskuteblan per Interreto ĉe www.3zzz.com.au. Ĉiun lundon, je 1ptm-2ptm estas nova programo, kiun oni povas aŭskulti kiam ajn dum la semajno. Ĉe la retpaĝo de 3ZZZ ĉe la maldekstra supra parto de la paĝo estas butono kiun oni povas premi por elekti deziratan lingvon. Selektu *Esperanto* kaj premu sur la butono Listen (= aŭskultu). La senkosta aŭskult-komputil-programo Real Player necesas por aŭskulti ĝin. Nenia “broadband” necesas!



• Konu viajn kungesamideanojn

Brendan Linnane

intervjuita de Katja Steele

La antaŭuloj de Brendan estis irlandanoj. Kvankam liaj patraj ge-avoj posedis bienon, ĝi sufiĉis nur por la unua filo, la aliaj infanoj, inter ili la estonta patro de Brendan, devis serĉi laboron aliloke. Li iris al Anglujo same kiel lia estonta patrino, flegistino. Ili geedziĝis en 1943. Unu jaron poste ili havis filinon, la 8an de aŭgusto naskiĝis eta Brendan.



En 1950 la familio migris al Aŭstralio, fakte al Adelajdo, esperante ke en la varma klimato est-

os por la patro-konstruisto multe da laboro. Unue la familio deziris migri al Kanado, kie estas multe da parencoj, sed la timo pri malvarmegaj vintroj malpersvadis ilin.

Ĉar Brendan naskiĝis en Anglujo, li estas brita. Laŭ la irlandana leĝo, se oni havas patron aŭ patrinon irlandan, oni estas irlandano. Ĝis 1973 validis leĝo, laŭ kiu, se oni estas civitano de Britujo, kaj deziras aŭstralianiĝi, oni simple subskribas formularon formalan. Ne necesis naturaliza ceremonio. Tiel Brendan iĝis ano de tri landoj.

El la 12 lernejoj jaroj gravis por Brendan la lecionoj de la latina kaj la franca, poste utilaj por la lernado de Esperanto. Li elektis la profesion de instruisto, por kio la registaro finance subtenis liajn postajn stud-



ojn, sed postulis, ke li laboru kiel instruisto almenaŭ tri jarojn. Post tri jaroj kaj tri monatoj en

la posteno Brendan konvinkiĝis, ke la instruisteco ne taŭgas por li kaj forlasis ĝin. Li volis nun esti aviada radiisto – tiu, kiu de iu flughaveno donas al la flugantaj aviadilpilotoj la necesajn informojn. Li esperis havi tiun postenon en oktobro 1973 kaj foriris el la instruistaj servoj jam maje por havi tempon vojaĝi tra Eŭropo. Sed la atendoj ne plenumiĝis, li do decidis serĉi laboron en Germanujo. Li dungigis kiel civilulo por la aerarmeo de tiea usona militbazo unue por ses monatoj, poste por pliaj du jaroj.

De tie li forvojaĝis al Usono. Kun grupo da dek unu aliaj samaĝuloj li per buseto travojaĝis la landon de Novjorko, Ĉikago ĝis Losanĝeleso kaj reen. Post tiu interesa sperto li iris al Kanado kaj dum ses monatoj li laboris kiel farbisto de internaj muroj de domoj.

Kvar jaroj for de la hejmo sufiĉis, sed revene al Aŭstralio Brendan haltis ankoraŭ en Novzelando, kie li havas parencojn.

Ree en Aŭstralio dum unu jaro li laboris kiel oficisto en sociala asekuro kaj en 1978 li iris al Melburno por preni parton en porradista kurso. Tie li restis du jarojn,

dum kiuj li renkontis, sian unuan edzinon Carol.



Kiel radiisto li laboris en Melburno, Alice Springs, ree en Melburno, Adelajdo Darvino kaj

refoje en Adelajdo. Kiam la registaro decidis nuligi la postenojn de radiistoj, Brendan laboris dum kvar jaroj ĉe Ausstudy, oficejo, kies tasko estis distribui la ŝtatan subtenmonon al studentoj. Unu el liaj postenoj estis tiu de kasisto. Kiel kasisto li havis malgrandan oficejon kaj kiam la laboro ne estis tro postula li aŭskultadis la radion. Iun tagon en 1993 li aŭdis tie elsendon de stacio 5EBI, kie Bill Menary kaj Kep Enderby parolis pri Esperanto. Por Brendan estis surprizo, ke tiu lingvo ankoraŭ ekzistas. Li iris al la anoncita prelego en la adelajda universitato kaj decidis lerni la lingvon. En la adelajda biblioteko li prunteprenis la unusolan tiean Esperanto-libron *Teach Yourself Esperanto*, ekstudis la libron kaj baldaŭ poste eniris la movadon.

Li prenis parton en la Universala Esperanto-Kongreso de UEA en Adelajdo en 1997, kaj parte ĉe-

estis somerkursarojn en Adelajdo kaj Melburno. Li intencis preni parton ankaŭ en la venontaj kursaro kaj kongreso en Tasmanio.



Lingvoj ĝenerale interesas Brendanon. Krom la anglan kaj Esperanton li parolas ankaŭ la

francan kaj germanan. Eĉ la ĉinan li iom parolas kaj komprenas!

Nuntempe Brendan laboradas por la ministerio de transportado. Li enkomputiligas raportojn pri trafikakcidentoj kaj lokigas tiujn akcidentojn sur la elektronikaj mapoj. Tiaj statistikoj multe helpas en la planado de novaj stratoj, pontoj, trafiksemaforoj ktp.

La edzino de Brendan ne estas esperantisto, sed ŝi plurfoje akompanis sian edzon al Esperantorarangoj. Brendan kaj Carol havas kune tri gefilojn, nome du filojn kaj unu filinon.

Al la demando, kion donis Esperanto al Brendan, li respondis: “Per Esperanto mi ekkonis multajn interesajn homojn, kun kiuj mi alie ne renkontiĝus.”

[El *Tamen Plu*] □

Mark Twain en Esperanto

Ĉu vi jam trovis la retejon <http://www.gutenberg.org/browse/languages/eo?> Iom post iom oni aldonas en tiu retejo esperantajn tradukojn de verkoj ne aliloke troveblaj en nia lingvo. Lastatempe aldoniĝis ses noveloj de Mark Twain: “Konfeso de mortanto”, “La fifama saltanta rano de Kalavera konteo”, “La rakonto pri la malbonkondata knabeto”, “La amaventuro de la eskimoa fraŭlino”, “Kanibalismo en la vagonoj”, “Bonŝanco”. Ankaŭ aliajn interesaĵojn esperantolingvajn vi trovos tie, por senpaga elŭto. □

Neforgesebla sperto de Franciska Toubale

Sciante ke mi ĉiam haltas ie en Azio, survoje al Eŭropo, pro la longeco de la vojaĝo, s-ro Lee Jung Kee, kiu instruis je la invito de Ĉo Turvey en la somerkursaro de Sidnejo antaŭ kelkaj jaroj, proponis al mi veni al Koreujo kun dudeko da esperantistoj el la tuta mondo por eklerni pri Ŭonbulismo, branĉo de Budhismo. Delonge mi demandis min ĉu Budhismo estas religio aŭ nur vivmaniero, filozofio. Pro scivolemo, mi akceptis kaj kiel planite estis akurata je la rendevuo en la stacidomo de Seulo.

De tie juna esperantisto akompanis min kaj Masayuki Kobayashi el Tokio al la trejnejo Samdong en Songĝu, montara urbeto, duonhoron for per aŭto de la urbo Daigu.

La celo de nia restado ne estis ekzakte kiel unue prezentita. Ĉe estis dek unu japanaj esperantistoj, anoj de Oomoto. La Ŭonbulismanoj kaj oomotanoj havas regulajn interŝanĝojn. La titolo de la renkonto fariĝis medito-kurso.



Dum la unuaj tri tagoj la tagordo estis la sama: komenco de meditado je la 6a, matenmanĝo

je la 8a, de la 9a ĝis la 12a prelego de la granda majstro Seungsan pri la vero de la cirklo, de la 12a ĝis la 14a tagmanĝo kaj ripozo, de la 14a ĝis la 17a prelego kaj diskuto pri la enhavo de niaj taglibroj, vespermanĝo je la 6a, de la 8a ĝis la 22a ĉantado kaj riverenco, plenumo de

la taglibro.



La du lastajn tagojn ni trapasis, vizitante plurajn templojn rilatajn al la vivo de grandaj figur-

oj de Ŭonbulismo.

Tie ni estis akceptitaj per bon-gustaj fruktoj ĝis ni atingis la trejnejon Bene, en la montaro pli sude. Tiu trejnejo situas en bela loko, apud rivero kun akvofaloj. La pinto de la montoj perdiĝas en la nuboj. Tiam feriiis multaj infanoj. La plej kuraĝaj provis sian anglan kun ni. Okazis du imponaj ceremonioj: la malfermo de la medito-kurso kaj la akcepto de la ĉefmajstro de Ŭonbulismo. Ambaŭokaze juna japana esperantistino Juu Ŝimomukai ludis fluton, Kyoko Shiotani kantis kaj ludis koton kaj la tuta grupo harmonie kantis adorkantojn de la Oomoto-kredo.

Mi unue timis ke mi ne kapablos vivi laŭ tiu ritmo al mi tute ne kuitima. Sed la etoso estis ege malstreĉita. Ĉiu partoprenanto agis laŭ sia kapablo kaj konscienco. La organizantoj ĉiam montris grandan subtenon por niaj streboj. Mi lernis ke eblas mediti kuŝante, starante, eĉ dancante. Mi aparte ŝatis tiun ĉiutagan dancon je la fino de kiu duope oni gestis per brakoj kvazaŭ oni donus ion unu al la alia. Kiel praktikanto de aikido de jam pli ol dudek jaroj mi ne povis revii pri pli bela oportuno. La fondinto de aikido

Morihei Ueshiba estis ankaŭ oomotano, jam de la kreado de tiu kredo de Deguĉi Onisaburo. Tiu milita arto estas daŭre praktikata de la oomotanoj, laŭ la pura tradicio.

Mia restado en trejnejoj Samdong kaj Bene purigis mian menson de la negativajoj, kiuj pezis ĝin antaŭ mia foriro pro la ĉijara mala-

mika rilato kun la estrantoj de Aŭstralia Esperanto Asocio kaj ebligis min renkonti miajn familianojn kaj amikojn kun paca kaj malferma spirito. Mi estas ege dankema al ŝero Lee Jung Kee, kiu donis al mi oportunon sperti tiun neforgeseblan travivaĵon. □

Vintra Kunveno en NSW

Presenting Esperanto / Videbligu Esperanton

“Estis, Estas, Estos”

(Friday, June 29 – Sunday, 01 July)

Hosted by EFNSK nsw@esperanto.org.au

Vendredo: 7.00pm

Parolado: “Zamenhof’s Language, Zamenhof’s Philosophy”.

Sabato: 8.30 – 10.00am:

Prezento / Parolado / Diskuto: Australian Esperanto History Overview – Successes and Failures: Learning from the Past.

10.15 - 11.45am:

Prezento / Parolado / Diskuto: The Current State of Esperanto in Australia Today – Strengths and Weaknesses: Understanding the Present.

12.00 – 2.30pm:

LUNCH: “Pikniko en la Parko / Picnic in the Park” – Possible BBQ.

2.45 – 4.15pm:

Prezento / Parolado / Diskuto: The Future of Esperanto in Australia – Planning for the Future: Aims and Goals.

4.30 – 6.00 pm

Prezento / Parolado / Diskuto: The Future of Esperanto in Australia – Planning for the Future:

Strengthening and Building the Membership.

6.30pm:

Dinner at a Café / Restaurant or at Esperanto House.

8.00 / 8.30pm:

Film or Games or Party at Esperanto House.

Dimanĉo: Libro Festo

(For further information: contact nsw@esperanto.org.au)

Possible Activities:

Presentation of Libroservo Books / Book Sale

An Auction? Giveaways.

Unveiling of EFNSK Library.

Presentation on the Libroservo / Presentation on the AEA Library Situation.

Presentation of the Libroservo – retbutiko

Book Talks – Reviews of books in Libroservo stock / Discussions.

Poetry Recitals – from poetic works in Libroservo stock. □



• For the Beginner

What is an “official” word?

Back in the year 1905, at the first Universal Esperanto Congress, it was decided to adopt a standard which could play the role which in other languages is played by the grammar and vocabulary accumulated over the centuries. The reason for this was that Esperanto was now 18 years old, and, with a flourishing publishing industry, international conferences, and practical use, it was no longer just a “project” for an international language, but a well established, functioning language whose speakers could be found throughout the world. The need to coordinate the usage of Esperanto among such a wide population was going to be important.

A book, titled *Fundamento de Esperanto* (“Foundations of Esperanto”) had been compiled, consisting of a series of smaller publications from earlier years. The content consists of a Preface, explaining the purpose of the book, a brief sketch of the grammar, in five languages (French, English, German, Russian, Polish — but, interestingly, not Esperanto itself), a series of “Exercises” (*ekzercoj*) showing how the grammar could be applied in actual usage, and a dictionary which listed about 2900 Esperanto word roots with translations into the same five languages. What is particularly striking about the *Fundamento de Esperanto* is its lack of word definitions and its very cursory presentation of grammar. The

Preface goes to great lengths to emphasize that it is presenting a standard from which Esperanto can evolve. Some Esperantists mistakenly think of the *Fundamento de Esperanto* as intended to be a sort of ultimate rule-book. On the contrary, it is intended to be a statement of what the basic standard of Esperanto was in 1905. In particular, it was stated that nothing in the grammar or vocabulary or word usage in the *Fundamento de Esperanto* is to be changed, but it may well happen that eventually it will come to present an archaic form of the language, that has since evolved considerably in grammar, vocabulary, and — obviously — usage.

The 2900 basic word roots are, and were, hardly enough for the needs of a fully fledged language. Consequently, the same Congress in 1905 established a “Language Committee” to oversee the development of the language. This Committee no longer exists, but one of its subcommittees, called the Akademio de Esperanto, continues on. Its role is to advise on language usage, when major uncertainties arise; and to compile supplements to the original 2900 word roots included in the *Fundamento de Esperanto*. There have been nine such supplements published so far, the most recent in March of this year. For the first time the 2007 Supplement contains definitions of the supplementary terms. [Continued on p.30.]

Message from the secretary:

Over the past few years the government has ratified several new pieces of legislation that affect our Association. To comply with these changes our Constitution should be updated.

This is an issue that the estraro and AEA members have been discussing for some time now and, as a first step, your estraro has named a commission of volunteers to commence this work. This commission consists of Miranda Lutz, Stephen Pitney, Gordon Coleman and Tim Wade-Ferrell who will work together with our solicitor Graham Wheeler to produce an updated draft constitution for consideration.

There have been several suggestions already made for changes which include postal voting, number of estraro members, role of the state representatives, and conflict resolution procedures. We ask now that anyone who is interested in making suggestions about our constitution to contact the commission and advise us of these possible changes.

With this copy of *ENK* you will find a form that can be completed or alternately you can download a copy from our website at <http://aea.esperanto.org.au/english/docs.html> or send an email to:

<sekretario@esperanto.org.au>. Your suggestions will be considered by the commission who will work together to produce our new consti-

Mesaĝo de la sekretario

Dum la lastaj kelkaj jaroj la registaro konfirmis plurajn novajn leĝaĵojn kiuj tuŝas nian Asocion. Por konformi kun ĉi tiuj ŝanĝoj nia Statuto devus esti ĝisdatigota.

Ĉi tiu estas afero kiun la estraro kaj AEA membroj estis diskutantaj dum kelke da tempo, kaj kiel unua paŝo, via estraro nomumis Komisionon de volontuloj por komenci ĉi tiun laboron. Ĉi tiu komisiono konsistas el Miranda Lutz, Stephen Pitney, Gordon Coleman kaj Tim Wade-Ferrell kiuj kunlaboros kun nia advokato, Graham Wheeler, por produkti ĝisdatan statuton.

Pluraj proponoj jam estas faritaj por ŝanĝoj. La proponoj konsistas el voĉdonado per poŝto, nombro de estraro-membroj, rolo de la Ŝtataj reprezentantoj, kaj konflikt-solvaj proceduroj. Ni nun petas ke iu kiu interesiĝas fari proponojn pri nia statuto, kontaktu la komisionon kaj informu nin pri eblaj ŝanĝoj. Kun ĉi tiu eldono de *ENK* troviĝas formularo kiun oni povas utiligi; alternative, oni povas elŝuti ekzempleron el la retejo

<http://aea.esperanto.org.au/english/docs.html> aŭ sendi retmesaĝon al <sekretario@esperanto.org.au>.

Viaj proponoj estos konsiderataj de la komisiono kiu kunlaboros por produkti nian novan statuton.

Ni petas ke iuj proponoj estu faritaj ĝis la fino de majo 2007, por ke la komisiono havu sufiĉe da tempo por konsideri la aferon kaj pro-

tution. We ask that any suggestions be made by the end of May 2007 so the commission can have time to consider the issues and to produce a proposed new constitution. We aim to have the proposed new constitution sent to members as soon as possible. Members will be informed of the new constitution at least 3 months before a vote will be taken to accept this new constitution. Our current constitution is available from our website or please do contact us if you would like a copy sent to you. We believe this process will give all members who are interested in having a say about our constitution a way of making a contribution to our association.

We look forward to hearing from you.

Regards, Miranda Lutz

[from page 28]

The 2900 word roots in the *Fundamento de Esperanto* and the terms in the nine *Official Supplements* constitute the “official” vocabulary of Esperanto, the standard which it is expected that all new Esperanto dictionaries will include, so that, for example, an Italian-Esperanto dictionary, a Chinese-Esperanto dictionary, and an English-Esperanto dictionary will have a communal stock of Esperanto words. In addition, of course, there are many thousands of other Esperanto terms, for the most part technical vocabulary, proper nouns, etc. in use. The largest Esperanto dictionary, the all-Esperanto *Nova Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto* of 2002 lists and defines approximate-

dukti la proponitan novan statuton. Nia celo estas ke la proponita nova-statuto estu sendita al membroj kiel eble plej baldaŭ. Membroj informiĝos pri la nova statuto almenaŭ 3 monatoj antaŭ ol voĉdonado por la nova statuto okazos.

Nia nuna statuto estas havebla ĉe nia retejo; aŭ bonvolu kontakti nin se vi dezirus ekzempleron senditan al vi. Ni kredas ke ĉi tiu procedo donos al ĉiuj membroj oportunion komenti pri nia statuto, kiel ilia kontribuo al nia asocio.

Ni antaŭĝuas respondon de vi.

Miranda Lutz

ly 46890 Esperanto words, according to its prefaces.

It is important to keep in mind that the *N.P.I.V.* has no *official* status. Just like dictionaries of English, it registers and defines as well as it can the vocabulary currently in use in Esperanto.

Despite its very high cost (well over \$100), the *N.P.I.V.* should be available for serious Esperantists to consult, and hopefully will be in local Esperanto groups' libraries. The small Esperanto-English and English-Esperanto dictionaries available are helpful, but inadequate for serious use.

There is no governing body of Esperanto; like all languages, Esperanto relies on the consensus of its users for its development. — ☐ ☐

Kiel Kontribui al Esperanto sub La Suda Kruco

Ni akceptas eseojn, ideojn, rakontojn, esprimojn de vidpunkto, leterojn, desegnaĵojn, fotojn, kaj iun ajn alian originalan materialon. Ni preferas ricevi kontribuojn per e-poŝto. Surpaperaj tekstoj devas esti klare tajpitaj per freŝa rubando. Tajpu sur nur unu flanko de ĉiu folio, kun ekstra spaco inter ĉiuj linioj. Netajpitajn manuskriptojn ni ne akceptas.

Limdato por la julio-aŭgusta numero: 5a de junio 2007

La redaktoro rajtas redakti, korekti kaj konformigi al la stilo kaj kutimo de ĉi tiu gazeto ĉiujn tekstojn antaŭ aperigo. Laŭbezone teksto povas esti mallongigita.

Esperanto Sub La Suda Kruco

P. O. Box 643 • York WA 6302 • Aŭstralio
esk@esperanto.org.au



La Aŭstralia Esperanto-Asocio

143 Lawson St • Redfern NSW 2016 • Aŭstralio

<http://www.esperanto.org.au/>

Prezidanto: **Igor Couto** | prezidanto@esperanto.org.au

Sekretario: **Miranda Lutz** | sekretario@esperanto.org.au

Kasisto: **Stephen Pitney** | kasisto@esperanto.org.au

Membreco: \$40 por individuo aŭ klubo [+ \$6 por familiano(j) ĉe la sama adreso].

Por studento aŭ pensiulo: \$25. Asocia membreco: \$12.

Pagu al Libroservo de AEA | libroservo@esperanto.org.au



La Novzelanda Esperanto-Asocio

P.O. Box 8140 • Symonds St • Auckland 1035 • Novzelando

<http://www.esperanto.org.nz/>

Prezidanto: **David Ryan** | <http://www.ryangomez@xtra.co.nz/>

Kasisto: | **Don Rogers** | don-cles@ihug.co.nz

Sekretario: **Bradley McDonald** | bradley.m@xtra.co.nz

Membreco: \$40 por individuo, \$50 por geedza paro; \$10 por studento aŭ junulo
(<20-jara: Klubo: \$1 por ĉiu ano

Sendu vian kotizon al la Kasisto ĉe la asocia adreso

Wholly printed in Australia.

Typeset by Donald Broadribb, PO Box 643, York WA 6302.
Printed by Monash University, Wellington Road, Clayton Vic.

esperanto sub

LA SUDA KRUCO

if undeliverable return reply paid to:

D. Broadribb • P. O. Box 643 • York WA 6302 • Australia

Print Post Approved:

PP631048/00005

POSTAGE
PAID
AUSTRALIA

**SURFACE
MAIL**